

## NEKROLOGO.

Terura bato frapis la Esperantistan Grupon de Verviers kaj samtempe la tutan belgan esperantistaron.

S-ro PAROTTE, unu el niaj plej malnovaj samideanoj, Komitatano de Belga Ligo, eksprezidanto kaj membro-fondinta de la Verviers'a grupo, mortis en tragediaj cirkonstancoj! Samideano Parotte, kiu, dum la lasta kongreso, tiel lerte gvidis nin tra la muzeo; Parotte, kiun ni vidis tiel vigla kaj bonhumora, ne plu estas!

Dimanĉon, 6-an de decembro, S-roj Etienne, Troupin, Eduardo kaj Jozefo Hérion, anoj de la Esperantista grupo, decidis fari ekskurson al «Baraque Michel» kaj invitis S-ron Parotte ilin akompani. Tiu ĉi, sendube, foriris tro malfrue ĉar li ne estis ĉe la rendevuo kaj la kvar amikoj daŭrigis sen li la ekskurson. Ĉu Parotte malfruiĝinte kaj nepre dezirante trovi siajn kamaradojn, laŭiris, tra neĝoj kaj arbaroj, mallongigan vojeton? Kvankam tre bone konante la regionon, ĉu li devojiĝis kaj falis en unu el la oftaj truoj de la «Fagne»? plej verŝajne ĉar la enketo montras, ke li tordigis al si la dekstran piedon. Oni supozas, ke li sidigis sur la neĝon por flegi sian piedon sed kaptita de la mararmo kaj de la mistera dormiga influo, kiun havas la neĝo, li ekdormis, por ne plu vekigi!

Estas nur la vendredon, post ses tagoj do, ke, malgraŭ ĉiuj klopodoj de liaj amikoj, ĉasgardisto retrovis la kadavron de nia malfeliĉa amiko!...

La enterigo okazis lundon, 14-an de decembro, meze de multnombra amikaro. La Esperantista Grupo de Verviers estis reprezentata de granda anaro kun la verda flago. S-ro Pirnay, Prezidanto, diris la aliaŭan vortojn je l' nomo de Belga Ligo kaj de sia grupo.

S-ro Parotte estis nur 50 jara kaj kunvivis kun sia 83 jara patrino. Ni perdas lertan samideanon kaj sinceran amikon!

«Belga Ligo Esperantista» kaj «Belga Esperantisto» prezentas al la kompatinda patrino kaj familio siajn plej emociajn kondolencajn sentojn.

---

## MONUMENTO AL JOS. PAROTTE.

Speciala komitato estas fondita en Verviers por starigi rustikan monumenton sur la loko, kie mortis nia samideano. Tiu komitato enhavas delegiton de la diversaj societoj de kiuj la kara mortinto estis membro, tio estas: Soc. d'Archéologie et l'Histoire, Cercle des Sciences, Cercle des Beaux-Arts, La Mutuelle, Université Populaire, Esperantista Grupo Verviers kaj Vieux-Liège; ĝia prezidanto estas S-ro Advokato Albert Bonjean, la plej fervora kaj malnova Fagno-amanto, ĝia vic-prezidanto: S-ro Comhaire, direktoro de Vieux-Liège.

La Esperantistoj, kiuj memoras S-ron Parotte kaj lian bonhumoron kaj kiuj volas dediĉi iom da mono al la starigo de la monumento, povas de nun sendi sian obolon al la poŝt-ĉekkonto No 1516.10 de «Esperantista Grupo, Verviers», kun la mencio «Monumento Parotte».

Monumento inaŭgurita je 7 oktobro 1928, vojo al Jalhay, apud 'Marie Thérèse' (BE okt.-nov. 1928, p. 214)